

BELGA ESPERANTISTO

47a Jaro — N-ro 1a — Januaro 1955a

Fondita
en 1908a

Redaktejo-Administrejo:
de la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Abonprezo:

Fr. 100,-

Montevideo

Tiu ĉi numero, kiu aperas je la fino de januaro, estas tamen preparita je la komenco de la monato, kiam ni jam ne havis oficialajn detalojn pri la evoluo de nia afero en Montevideo, krom la mallonga novaĵo, kiun ni presigis jam en nia antaŭa numero.

Ni donos pliajn detalojn en la sekvonta kaj tre baldaŭ aperonta numero.

Diru ni tamen, ke la situacio, kiu iĝis tre malfavora en la speciala komisiono, estis, — subite kaj kontraŭ ĉiu espero — plene renversata, en la kunsido de la Plenuma Komitato, dank' al la eksplodo de indigno, kiu evidentiĝis en la tagaj ĵurnaloj de Montevideo, pro la kontraŭ-kultura

Lingvo kiel socia kaj politika faktoro en Eŭropo

Jen la temo, kiun S-ro Stanley Rundle pritraktas en libro, kies angla titolo tekstas: „Language as a social and political factor in Europe”. Ĝi jam aperis en 1946, ĉe la eldonista firmao „Faber and Faber Ltd. 24 Russel Square, London. W.C. 1.

La verkisto estas angla filologo kaj okupas sin pri la studo de dialektoj. La kaŭzo, ke ni ĉi tie parolas pri ĉi tiu libro estas, ke la enhavo por ni

sintenado de la Komisionanoj.

Ke tiu indigno de la tieaj ĵurnalistoj estis aktive fajrigata de la U-rugvaja Esperanto-Ligo, de ties gvidantoj kaj de D-ro Lapenna, ĉiuj komprenos.

Sed la afero pruvas, ke oni neniam rajtas malesperi, nek rezigni.

Ofte okazas, ke malvenko iĝas venko!

esperantistoj, estas tiel grava, ke ni opinias ĝian diskonigon vere rekomendinda.

En la unua parto, la verkisto pritraktas laŭ historia vidpunkto la estiĝon de la lingva diverseco en Eŭropo kaj priparolas kiel de tempo al tempo okazas miskomprenoj; kiel facile povas estiĝi kvereloj pro la ekzisto de diferencaj lingvoj en la sama lando kaj fine kiel lingvo povas servi kiel instiganto de malfacilaĵoj. Fine de la unua parto li donas la jenajn punktojn kiuj klare prilumas la aspektojn de la lingva problemoj.

1e. Miskomprenoj kaj mistradukoj okazantaj en interpopolaj komunikaĵoj.

2e. Lingvo kiel portanto de pensoj dividas nin en apartajn grupojn laŭ pensado kaj kulturo.

3e. Lingvaj diferencoj multe limigas la interkomunikaĵon inter popoloj.

4e. Administrataj malfacilaĵoj estiĝantaj pro la ekzisto de lingvaj diferencoj enlandaj.

5e. Limigo, pro lingvaj kaŭzoj, en la elekto de kandidatoj por regaj postenoj.

6e. Lingvo estas rigardata kiel nacia insigno kaj homoj sentas parencecon kun aliaj kiuj parolas la saman lingvon.

7e. Pro la karaktero de lingvaj bariroj estiĝas problemoj pri malplimultoj, kiuj neniam povas esti solvataj.

8e. Lingvo povas fariĝi instrumento por tiuj, kiuj deziras estiĝi entuziasmon por specialaj politikaj faktoj.

En la dua parto la aŭtoro donas superrigardon pri la lingvoj, kiujn oni parolas en ĉiu eŭropa lando kaj montriĝas, ke ekzistas landoj, kies loĝantoj parolas pli ol dek diferencajn lingvojn. Entute en Eŭropo paroliĝas proksimume 40 lingvoj.

Jen la konciza skemo pri la lingva problemoj en Eŭropo.

En la tria parto la verkisto okupas sin pri la solvoj, kiuj de tempo al tempo estas proponitaj.

1e. Ebla solvo estus, se oni en la lernejoj de multaj landoj instruus multajn diferencajn lingvojn. Sed kla-

40a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO Italujo - Bolonjo - 30an de julio - 6an de aŭgusto 1955

Kiel jam konigite la du ligaj kasistinoj cerbumis por organizi, se eble, karavanon al la Universala Kongreso.

La kasistino de Rega Belga Ligo Esperantista kolektos ĉiujn enskribojn:

Jen la kotizoj:	ĝis 31/3/55	post 31/3/55
Individuaj membroj U.E.A.	270	320
Edzino	135	160
Studento	160	190
Ne individuaj membroj UEA	320	370
Edzino	160	185

Aligilojn kaj kotizojn oni sendu al: P.C.K. 236804 de S-ino Julia Plyson, rue Jourdanstraat 185, Bruselo.

La kasistino de Flandra Ligo Esperantista ellaboris jam belegan 17-tagan aŭtobusan vojaĝon laŭ la orienta parto de Francujo, la Mediteraneo al la Kongresurbo, kie la aŭtobuso restus je nia dispono por kelkaj ekskursoj kaj malgrandaj lokaj translokigoj.

Post la Kongreso, vizito al Venezia kaj reveno laŭ la Dolomitoj, Innsbruck, tra Visujo, Francujo, Luksemburgo.

Por tiu vojaĝo oni devas kalkuli ĉ. 500 frankojn po tago, sed tiu prezo entenus ĉion: la tutan vojaĝon, ĉiujn tranoktadojn, tri manĝojn ĉiutage kaj ĉiujn taksojn kaj servmonojn.

Tre bonaj hoteloj kaj restoracioj garantiitaj.

La personoj kiuj ŝatus partopreni, sin anoncu kiel eble plej baldaŭ al F-ino J. Terry, Raapstraat 74, Gent.

re kaj racie la aŭtoro montras la neblon de tiu solvo.

2e. Alia solvo estus, se en ĉiuj landoj de Eŭropo oni instruas en la lernejoj unu solan fremdan lingvon kiel internacian helplingvon. Kompreneble ĉi tie tuj starigas la demando: kiun lingvon elekti? Estas vere, ke en multaj landoj oni instruas la modernajn lingvojn sed tio tute ne okazas por helpi forigi la lingvan problemon.

Generale tiuj lingvoj estas instruataj nur por ke la lernantoj povu trapasi ian ekzamenon kaj sukcesinte en tio, ili preskaŭ ne plu uzas la lernita(j)n lingvo(j)n. S-ro Rundle faras atentindajn rimarkojn rilate la instruadon de fremdaj lingvoj.

Antaŭ ol esplori kiu lingvo plej bone taŭgos por la funkcio de internacia lingvo, la aŭtoro prezentas kelkajn meritojn kaj kvalitojn, kiujn la elektota lingvo devas posedi por povi plenumi tiun taskon. Sajnas al ni bone, nun doni la parolon al la aŭtoro mem

"Language is a medium in with to think and express our thoughts; it is a conventional system which has to be learnt. The language chosen must therefore be capable of expressing the thoughts that modern men and women want to express. It must also be sufficiently simple for those who are not already acquainted with it to learn it efficiently with as little trouble as possible."

The former of these two criteria concerns the efficacy of the language for its task. To be satisfactory it must be a language which can be spoken as well as written. It must be reasonably pleasing to the ear. It must be as unambiguous and precise as possible and able to express almost any desired idea or shade of meaning. At the same time it must be fairly concise. It must be comparatively stable and not likely to split into numerous local variations or dialects. It must also be capable of an easy natural growth within itself, so as to cater for the changing and developing needs of mankind. Although it must be a flexible organism and not a mere lifeless code, it would be well for it to be neutral, and not specially favouring any nation."

The second criterion concerns the teaching and learning of the language. Opinions differ somewhat as to what constitutes the main difficulty in language learning. It probably differs from person to person. One point frequently mentioned is the difficulty of learning a large vocabulary. However, it is quite obvious that the vocabulary must not be unnecessarily large. It would also help if a great number of words were already recognizable to most people. It must be remembered that the idea of this is not to make it

possible for people to guess the meaning of words and passages in the international language, but merely to ensure that the vocabulary can be learnt with the least possible strain on the memory, and that people when speaking should be able to "find" the word they want with as little difficulty as possible. The language, too, should be reasonably phonetic. At any rate, someone speaking the language should be able to write any word he can pronounce, or pronounce immediately any new word he may see written. The language we choose as an international auxiliary should have no "idioms" or illogical constructions. The grammar and syntax must appear as logical as possible to all those who are called upon to use it. For this reason there should be no irregularities in the grammar, and it should be as simple and straightforward as possible."

Karaj gelegantoj, ĉar ĉi tiu citaĵo ne estas tre mallonga, ni devas rezigni pri la traduko en esperanton por ne uzi tro multe da spaco sed ni opinias ke ankaŭ sen traduko vi povos kompreni la enhavon kaj ni estas konvinkitaj, ke vi rekonos multajn argumentojn en la rezonado de S-ro Rundle, kiujn ankaŭ D-ro Zamenhof jam eldiris pri Esperanto kaj kiujn Esperanto plenumas. Post ĉi tiu citaĵo, la aŭtoro esploras en kia grado la ekzistantaj lingvoj naciaj povas plenumi la postulojn prezentitajn en la citaĵo. Tiel ekzameninte la latinan, grekan, francan, germanan, hispanan, rusan kaj anglan lingvojn, li fine konkludas ke pro diversaj kialoj neniuj el la nomitaj lingvoj povas plenumi la postulojn cititajn. Certe niaj gelegantoj interesiĝos pri tio, kion la aŭtoro tiurilate diras pri sia propra lingvo, la angla. Ni donas denove la parolon al li.

"The disadvantages of English are, however, very great. The spelling of English is probably the most unphonetic of all European languages. The pronunciation is simply bristling with difficulties. Even the accent or stress on certain syllables of words is most confusing to foreigners. The large vocabulary of English, while being the source of great lucidity of expression when correctly used, presents tremendous difficulties to the foreigner. Quite apart from the magnitude of the task of memorizing the words, many of the words have several meanings, and there are often several different words expressing very close shades of meaning. There are very strong historic associations bound up with many English words. So far as grammar is concerned, there is certainly less to learn in English than in most languages. Nevertheless, this can be a hardship to people who

feel the need of grammatical devices to help them to express their meaning. We English make up for the lack of grammar by a greater dependence on word order and on a most elaborate and extensive range of idiomatic expression. In any case, the small amount of English "grammar" which does exist is terribly irregular."

Jen, do la juĝo de kompetenta persono pri sia propra lingvo. Ĉu ne estas iom strange, ke ofte multaj ne-angloj opinias pli bone povi juĝi pri la taŭgeco de la angla lingvo por la funkcio de internacia lingvo ol la angloj mem? Ni memorigas ĉi tie ekzemple la artikolon de S-ro Dudok en „Het Parool” kaj speciale ankaŭ la agojn de S-ro Koch, ano de la konsilantaro en Arnhem, pro lia propono fari Arnhemon aŭlingva per la akcepto de la angla.

Ĉar do ankaŭ la 2a solvo ne donas kontentigan rezulton, la aŭtoro transiras al 3a, nome la aplikado de artefarita lingvo kiel internacia. En la koncerna ĉapitro li pritraktas i.a. Volapuk, Basic English, Ido, Speed Words kaj Esperanto. Li konstatas ke Volapuk jam mortis, ke Basic English ne taŭgas, ke Ido, reformprojekto de Esperanto ne sukcesis kaj ke ankaŭ Speeds Words ne havas ŝancon. Nur Esperanto laŭ lia opinio havas bonan ŝancon fariĝi internacia lingvo. Atentiginte pri la faktoj, ke Esperanto jam suferis diversajn batojn kaj kritikojn li diras la jenon.

"In spite of these objections, Esperanto has shown that it is a language which can be learned, can be spoken and can perform the tasks expected of it. While it is far from perfect — and what human project can be perfect, especially after nearly sixty years of examination and criticism? — the quality of the translations which have been made into Esperanto and the value of its ever growing literature, testify to the fact that the language is worthy of very serious consideration as a candidate for the rôle of international auxiliary language."

Karaj gelegantoj, ĉu vi ne samopini-as kun ni ke la diskonigo de la libro de S-ro Rundle estas grava, speciale por argumenti kontraŭ tiuj, ankoraŭ ĉiuforte asertas, ke la angla lingvo plej bone taŭgas kiel internacia lingvo? La enhavo estas multe pli riĉa ol ni povis montri en ĉi tiu artikolo kaj la studo de la libro certe valoras la penon kaj kostojn. Fakte neniuj aktiva esperantisto povas malhavi ĝin.

F.W.

La Redakcio...

atendas tuj la kontribuojn por la februara numero (aperdato: ĉ. 15.2); la marta nepe estu ĉe la leganto, la 1-an. Dankon!

Aligu al niaj Festoj!

Ĉiuj al Antverpeno

NIA JUBILEO

Pro la prokrasto en la apero de tiu ĉi numero, ĉiu fakte jam devus esti ensendinta sian aliĝon al la jubileaj festoj, kiuj okazos, nun tre baldaŭ, en Antverpeno, nome sabaton, la 12an kaj dimanĉon, la 13an de februaro.

Versajne, diversaj el niaj tre bonaj membroj, se ne multaj, ne jam tion faris, kaj tiamaniere malfaciligas la taskon de S-ro Sielens, nia ĝenerala sekretario kaj prezidanto de la loka organiza komitato kaj de liaj helpantoj.

Ĉar ili tre certe tion ne intencis, ni petas ilin TUJ sendi al S-ro Balleux, la sumon ŝuldatan, kiu estas, por la eksterantverpenanoj, por tiuj do kiuj bezonas loĝadon: Fr. 205 ĝis la 31a de januaro kaj Fr. 210 ekde la 1-a de februaro.

Tiu ĉi sumo enhavas la kotizon de Fr. 25 aŭ Fr. 30, laŭ la dato; la pago de la festeno, kiu altiĝas je Fr.

Sabaton, la 12an de februaro

Ekde la 14a: en „Witte Leeuw": Akcepto de la alvenontaj partoprenantoj; Je la 14a: Delegacia flordemeto sur la tombon de la prezidinto de Reĝa Belga Ligo Esperantista Frans Schoofs;

Je la 15a: Flordemeto antaŭ la Monumento al la Militmortintoj, en la urba parko Kunveno, je la norda angulo de la Nacia Banko, sur la Av. de Francujo.

Je la 15.30a: en „Witte Leeuw": FESTKUNSIDO de la Esperanto-Grupo „La Verda Stelo", kiu honorigos siajn ĝejubileantojn.

(Tiu ĉi Grupo efektive prokrastis tiun ĉi solenon kaj sian jarfestenon, kiuj ordinare okazas dum la dua duono de januaro, ĝis tiu ĉi dato, por ne malbone influ la partoprenon al la jubileaj festoj).

Je la 16.30a: Vizito al la nova Internacia Marista Domego;

Poste: Okazo por vespermango:

Je la 20a: en „Witte Leeuw": Kultura Horo, sekvata de BALO;

(Tiu ĉi kultura horo, de la 20a ĝis la 21a konsistos el la disaŭdigo de teatraĵeto aŭ pli bone ŝekĉaro de nia Liga Prezidanto, S-ro Maur. Jaumotte, rilate al la vivo de nia Majstro; disaŭdigo kiu akiris, pasintan jaron en Antverpeno, plej grandan sukceson).

* *

(Dum la dimanĉa tago, estos en la Internacia Marista Domo okazo por vizito de la Ekspozicio, kiu estos organizata, dank'al la kunhelpo de ĉiuj, kiuj posedas malnovajn dokumentojn pri nia Ligo kaj pri la pionira esperanto-vivo en Belgio... Dokumentojn, kiujn oni do sendu TUJ al la Liga Prezidanto).

Dimanĉon, la 13an de februaro

Je la 8.45a Di-servo en preĝejo Sta. Juliano, Van Maerlantstraat 48, kun prediko en Esperanto de Abato Muller.

Je la 10a (prec): en la Urbdomo: OFICIALA AKCEPTO, okaze de la Ora Jubileo;

Je la 11a: en la Internacia Marista Domo: JUBILEA KUNSIDO DE R.B.L.E.;

Je la 13a: en la Internacia Marista Domo: FESTENO (Fr. 110 trinkmono en kalkulita).

Je la 15.30a: Teatra aŭ Kabareta Posttagmezo;

De la 17.30a ĝis la 18a: Adiaŭo... aŭ agrabla kunrestado!

* *

Ni atentigas ke ne plu povos esti, nek citataj nek honorigataj dum la jubileaj festoj, tiuj veteranoj kaj jubileantoj, pri kiuj ni ne estos ricevintaj informojn, ĉu de la grupaj sekretarioj ĉu de la interistoj mem, almenaŭ ok tagojn antaŭ la festoj. Oni do poste ne kulpigu la Ligeŝtraron, kiu de tri monatoj petas informojn, kiujn ĝi, tre versajne, ne de ĉiuj jam ricevis.

Antaŭdankon al ĉiuj, kiuj helpas kompletigi kiel eble plej multe, niajn informojn kaj kiuj ensendos ankaŭ dokumentojn por nia Ekspozicio.

Niaj Veteranoj

La diferenco inter la jubileantoj kaj la veteranoj estas ke jubilei povas en nia Ligo nur tiuj samideanoj, kiuj de almenaŭ 1915, seninterrompe, — krom la militaj periodoj —, estis kaj restis membroj de nia Ligo.

Veteraneco kontraŭe rilatas nur al la daŭro de la esperantisteco. Kaj povas kaj devas esti konsiderataj kiel veteranoj, membroj de nia Ligo, ĉe se ili iamomente forlasis nian Ligon, ĉu pro la fakto ke, — dum la idista periodo, — la grupo al kiu ili aliĝis, iĝis idista grupo kaj ke ili momente kaj kelkfoje iom daŭre restis do ekster kaj flanke de niaj daŭrigataj klopodoj; ĉu pro alia kialo, kiu iĝis ilin serĉi alivojen la atingon de la komuna celo.

En la unua kategorio, estas nia kara S-ino Félicie Staes-Vandevorde kaj ŝia filino Elly. S-ino Félicie Staes iĝis membrino de „La Semanto", grupo de Laeken en 1905 kaj poste de „La Pioniro" de Bruselo.

Ŝi akiris la diplomon pri profesora kapableco en 1908, sed baldaŭ poste ŝia Grupo deflankiĝis por eniri la rangojn de la idistoj kaj ŝi restis ekster nia Liga movado ĝis en la jaro 1925, kiam F-ino Jennen ŝin reinteresiĝis al Esperanto.

En 1908, ŝi estis kompreneble kun-tirinta ŝian filineton Elly, sed ankaŭ tiu ĉi revenis al ni, en la jaro 1933.

Ambaŭ estas konataj, kiel nun plej fidelaj samideanoj, kiuj ĉeestis multajn internaciajn kongresojn, inter kiuj unuavice la 3an en 1907, Kembrigo, kaj ĉiujn naciajn kongresojn post sia reveno al ni. Ambaŭ ĉiam kaj ĉiamaniere helpas al la disvastigo de nia movado kaj la propagando por nia lingvo.

Laŭŝajne S-ino Félicie Staes tamen ne estas la dekanino de la veteranoj en nia Ligo: Versajne la palmo estos akirata de S-ro Verbanck, el Bruselo, kies nomon ni efektive retrovis, tre frue, en la revuo „Belga Sonorilo" kaj kiu antaŭmetis al ni, — por nia ekspozicio, — karton senditan de korespondanto el Norvegujo jam en la monato de marto 1903 kaj leterojn el tuj postaj tempoj.

Inter tiuj, kiuj, dum pluraj jaroj, staris ekster nia liga laboro, ni citu S-ron Jan Jacobs, kiu, — same kiel lia edzino —, estas esperantisto de longe antaŭ la unua mondmilito, nome de 1907.

S-ro J. Jacobs, kiu unue aliĝis al la antverpena grupo „La Suda Lumo", kies prezidanto li cetere iĝis, akiris sian diplomon pri profesora kapableco en la jaro 1909. Poste li iĝis mem-juganto por la sama ekzameno.

Li, dum multaj jaroj, estis komitatano de nia Ligo: Li tamen speciale

Poezia Angulo

LA INTERNA IDEO

Ĉu valoras ankoraŭ intensa batalo

Por vana afero spirita?

Ĉu valoras ankoraŭ por ni idealo

En tempo per zorgoj plektita?

Ĉu perdita ne estas la multa laboro,

Farita por homa kompreno,

Se ni trovas nin malgraŭ plej granda fervoro

Ankoraŭ sur dorna tereno?

Ĉu do estas mirige, ke l' paca armeo

Demandas sin en embaraso:

Ĉu valoras batal' por l' interna ideo.

Se stultas la homa amaso?"

Se ni kredus malsaĝe, kun stulta naivo.

Ke venos ĉielo sur tero,

Ni erarus sendube: en tiu ĉi vivo

Ne taŭgas ĉiela afero!

Sed ni prave batalas per bona estonto,

Bazita sur interkompreno,

Sen demona milito, la plej granda honto,

Nek ia simila malbeno.

La interna ideo ne estas himero

Sen bazo kaj sen perspektivo;

Ĝi promesas nenian ĉielon sur tero;

Nur estas lumpunkto de l' vivo.

Sur la vojo de l' vivo ĝi estas la stelo

Montranta en ĝusta direkto.

Sed ni bone konscias, ke de l' vivo la celo

Troviĝas en ĝia reflektio.

G.J.D.

AL NIA PREZIDANTINO *)

Virino tre nobla, kun altidealo,

Fervore nin gvidis en paca batalo.

La mort' ne permesis ĝis glori,

Sed iris el inter amikoj sin for.

Malĝojo nun regas en ronda amiko,

Pro bato de l' sorto kruela, tragika.

Amata estrino fariĝis viktimo,

Lasante funebron en ĉies anim'.

Vi celis, estrino, per via dediĉo

Nur efektiviĝon de l' homa feliĉo.

Ni ĵuras imiti la bonan ekzemplon,

Konstrui de l' homaranismo la templon.

G.J.D. 26.11.'54

*) S-ino M. Dekker-Hellingman, prezidantino de la Amsterdama grupo de L.E.E.N. post longa sufero mortis la 26an de novembro 1954a.

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO

Cu vi konscias

ke, por la ne-esperantista mondo, forta U.E.A. estas la plej frapa pruvo ke Esperanto vivas, ke ĝi pleje taŭgas por sia celo: elimini la lingvajn barojn inter la diverslingvaj nacioj;

ke U.E.A. estas vi, kaj mi, kaj ĉiuj individuaj esperantistoj, dissemitaj tra la tuta mondo; ke U.E.A. staros aŭ falos, laŭ tio, ke vi, kaj mi, kaj ĉiuj samideanaj esperantistoj konsentos — aŭ preterlasos — grupiĝi en internacia asocio;

ke nia esperantista idealo kaj la esperantista solidareco do postulas, ke vi, kaj mi, kaj ĉiuj samideanoj aligu al U.E.A. aŭ renovigu la aligon;

ke tiu aligo aŭ realigo certigas regulan, seninterrompan alsendon al la membroj de la Jarlibro kaj de la gazeto ESPERANTO, kaj evitigas superfluan ekstran laboron administran al la Centra Oficejo kaj al viaj perantoj;

ke la Jarlibro kaj ESPERANTO informas pri ĉio sciinda rilate la tutmondan movadon; Ne hezitu do havigi jam nun vian kotizon al via ĉefdelegito aŭ al via peranto: NEDERLANDO: Jacob Telling, Schietbaanlaan 106-a, ROTTERDAM, p.k. 2426.19

BELGIJO: F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, BLANKENBERGE, p.k. 4161.35 R.B.L.E., Falconrui 21, ANTWERPEN, p.k. 1337.67

La kotizoj estas	por Nederlando:	Por Belgio:
Membro kun jarlibro	gld. 3.75	B.fr. 50.—
Membro-Abonanto	" 10.—	" 140.—
Membro-Subtenanto	" 12.50	" 180.—
Patrono	" 50.—	" 700.—
Dumviva Membro	" 200.—	" 2800.—

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejlaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korseto - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.

ŝuoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arhitekt. Tel. 39.58.66

Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09

Henny de Ketelaere, Oostenstraat, 25, Antverpeno. Privataj lecionoj

Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14.

K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07

R. Vanistendael, Dambruggestraat, 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rab. 5 %

CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67.

L. Van Reybrouck, Venusstraat 33, Antverpeno: ĉiuj iloj por la hejmo. Tel. 32.43.88

Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.

Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20

J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81

J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspulso. Tel. 39.20.59

H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47

H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38

Verdijk, Oude Doncklaan 106, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07

P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofoj. Tel. 37.62.55

Y. Ameryckx, Helmsstraat 154, Borgerhout. Peltajoj.

M. Blajwas, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj ensiaj butikoj.

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81 Frizisto por sinjorinoj.

„De Boerinekens“ (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo.

A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikoloj-Selisto. Tel. 37.14.07

G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo

Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj.

Van Kerkhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj

R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj.

gardenilaro

Butiko Angora. (novaj galerioj), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofoj

sportŝuoj

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3

Farmaciisto N. Nelis, Meise

„BONBONS SWINNE“, 77, rue de Nieuwenhove

Imprimerie Liens, 18, rue de la Princesse

CARRELAGES „Carrart“, 19, avenue de Saŭo

Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57

Libroj, Publikajoj, jurnaloj. F-ino Kestens 24, rue Bodembroeck

Tinkturejo, senmakuligejo „DEX“ 16, rue Esnest Laude

15.26.01

59.13.73

44.57.38

21.10.98

21.74.49

15.96.97

11.71.03

15.28.29

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JACMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.

Vicprezidanto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.

Ĝenerala Sekretario-Kasisto: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falconrui, 21, Antverpeno.

(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

Atentigo kaj senkulpigo

Nia Liga Prezidanto, kiu ankaŭ prizorgas la revuon, estis dum pli ol du semajnoj, malebligata fari kion ajn pri Esperanto, pro la translokigo de la instalaĵoj de la fabriko, kiun li direktas en Boom al Vilvoorde.

Tio klarigas la aperigon de nia januara numero je la fino de la monato, anstataŭ en la mezo de la monato.

La novjaraj bondeziroj estas tamen jam transdonataj per la antaŭa numero, kaj S-ro Jaumotte senkulpigas sin do pro la prokrasto, kiu ne plu okazos proksiman monaton. Tial li petas la sekretariojn de la grupoj, senprokraste, tio estas TUI, sendi al li siajn raportojn kaj programojn.

Li aliflanke atentigas, ke li ne plu estas atingebla dum la laborhoroj ĉe la antverpena telefonnumero 78.01.49, sed al la Brusela numero 51.10.02.

La antverpenaj amikoj do, pro la kosto, prefere telefonos al li vespere, inter la 6.30 kaj 7.30a horo, kiam li fakte regule estas hejme.

Lia hejma numero estas Antverpeno 37.77.58.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“

(Poŝtĉeknumero 726.54)

Dum la lasta kunsido de novembro, la sekretario S-ro Verstraeten kaj F-ino Cla: ra Peeters ekaŭdigis bone preparitan teatran elsendaĵon, al kies realigo vigle kunlaboris S-ro Montmirail, nome de „La Embusko“.

Tiu ĉi teatrajeto akiris belan sukceson kaj tre certe, en baldaŭa estonto, tia ĉi klopodo estos refarata.

La 3an de decembro, okazis la parolata jurnalo, laŭ jam longa tradicio; kaj la 10an, S-ro W. Deroisy, jr. faris bonegan kaj bele, per lumbildoj ilustritan, paroladon pri lia unujara restado en Usono, kien li vojaĝis por daŭrigo de studoj.

Kvankam la verdstelanoj, en la lasta tempo, jam havis okazon aŭdi diversajn paroladojn pri tiu gradera lando. S-ro Deroisy, per siaj spritaj rimarkoj, sukcesis doni al siaj klarigoj tre personan karakteron kaj li akiris varman aplaudon.

La 17an, sekvis la Zamenhofa vespero.

laboris en la medioj de la instruistoj kaj ludis specialan rolon en ties nacia kaj internacia profesiaj unuiĝoj esperantistaj.

Li ankaŭ laboris en aliaj grupoj kaj ligoj kaj li havigis al ni, — antaŭ lia foriro por la vintroj monatoj al su-daj landoj —, la plej gravan materialon por nia ekspozicio.

Ni havos la okazon, dum la proksimaj festotagoj, pli detale reparaoli pri lia rolo en nia movado, dum la unuaj jaroj de nia Ligo.

Sed restas ankoraŭ multaj aliaj veteranoj, pri kiuj ni parolos en la sekvontaj numeroj de nia revuo.

lasta kunsido en la jaro 1954, dum kiu estis memorigata pri diversaj epizodoj el la vivo de D-ro Zamenhof kaj pri lia verko. Partoprenis al la efektivigo de la programo S-roj M. Jaumotte, M. De Ketelaere, H. Vermuyten, J. Verstraeten, Jan Jacobs kaj F-ino Henny De Ketelaere, kiuj ĉiuj estis longe aplaudataj.

Programo de la venontaj kunsidoj

Februaro: la 4an: Parolata jurnalo; la 11an: Lastaj aranĝoj por la jubileaj festoj; sabaton, la 12an, kaj dimanĉon, la 13an: partopreno en la ligaj jubileaj festoj; la 18an: Parolado de S-ro Advokato Guy Coopman pri „La unuigo de Eŭropo (kun filmoj); dimanĉon, la 20an, je la 20.30a: Karnavalbalo (kun temo por kostumoj, gekampanoj); la 25an: Parolado de F-ino Helène Hofkens pri „La Mahometana Arkitekturo“ (kun lumbildoj).

Marto: la 4an: Parolata jurnalo; la 11an: Teatra elsendaĵo; la 18an: Parolado de S-ro Jules Verstraeten pri „Vitrofabrikaĵo“; la 25an: Kabareta Vespero.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero 4835.32)

La kunveno de la 23a de novembro, post la kutima leciono de la elementa kurso, estis ĉefe dediĉata al legado kaj klarigado de kelkaj artikoloj en B.E.

Plia numero de la grupa parolata gazeto aperis dum la kunveno de la 30a de novembro, kun interesaj kontribuoj de F-ino P.

Lastmomenta novaĵo

Funebro

Je la lasta momento, — ĉe la presigo de la numero, — ni informigis pri la morto, post unujara malsano sur klinika lito, de nia kara samideano, festestrino de „La Verda Stelo“, F-ino Henriette Toussaint. kies interigon ĉestis multaj antverpenaj samideanoj.

La mortintino estis fratino kaj bofratino de G-roj Aug. Toussaint kaj de S-ino L. Bernaerts, onklino kaj praonklino de pluraj membroj de la nia Ligo kaj Grupo.

Al la kruele trafita patrino, al niaj geamikoj-familianoj iras niaj sinceraj kondolencoj okaze de la malperdo de tiu ĉi bonega amikino, pri kies kunlaboro ĉiuj ankoraŭ longtempe memoros.

De Staercke: „Ĉu vi vere vivas?“; S-ro E. Herreweghe: Piedpilka konkurso inter kelteroj kaj kuiristoj.“; S-ro Marcel Poupeye: La unua fluganta besto estis ŝafo.“; S-ro L. Van Wassenhove: „Flugantaj teleroj“; F-ino Yolande Van Parys: „André Carnegie“ kaj F-ino Yvonne Poupeye: „Niaj antaŭnomoj“.

Dum muzika vespero de la 7a de decembro, kelkaj belaj diskoj, pruntedonitaj de F-inoj G. kaj J. Gouwy kaj de S-ro E. Herreweghe, estis disaŭdigataj.

La kunveno de la 14a de decembro estis speciale grava:

1-e: lasta leciono de la elementa kurso, post kiu la kursgvidinto, S-ro Ch. Poupeye, gratulis la persistemajn gelernintojn kaj instigis ilin al plia praktikado de la lingvo. F-ino Georgette Gouwy, nome de ĉiuj gelernintoj, direktis kelkajn dankvortojn al la kursgvidinto kaj proponis al li belan donacon.

2-e: Zamenhof-memorigo. La prezidanto, S-ro Ch. Poupeye, alparolis la gemembrojn, okaze de la antaŭvespero de la naskiĝtaga datreveno de nia Majstro kaj legis mallongan tekston el kongresa parolado de D-ro Zamenhof, kiu estis Honora Prezidanto de la Bruga Grupo. Antaŭ ol disigi, la ĉestantoj hore kantis la Espero(n), kun pianoforta akompanado de F-ino Y. Poupeye.

La 21an de decembro, kiel ripetiga ekzerco, tekstoj el la „Ruĝa Broŝuro“ estis legataj kaj klarigataj, post kio portretludo finis la vesperon.

Ĵaŭdon, 23an de decembro, okazis eksterordinara kunveno, honore al nia simpatia membro S-ro F. Clauwaert, nuntempe sol-

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabeloj; KATOKULO, por signalvitroj.

1955 ? ? ?

Kiam, karaj legantoj, vi legas ĉi tiujn liniojn jam komenciĝis la nova jaro 1955 kaj multaj reciprokaj bondeziroj interŝanĝiĝis, sed bedaŭrinde ĉiuj plej boncelaj bondeziroj ne povas iel influ la iradon de la tempo nek la okazigon de la faktoj de tutmondaj cirkonstancoj. Do ankaŭ tio, kio okazos rilate al nia movado kuŝas ankoraŭ en la sino de la tempoj. Verkante ĉi tiun artikolon ni ne scias, kio estos la rezultato de la pritrakto de nia afero en UNESKO en Montevideo kaj kvankam ni ĉiuj esperas la plej bonan pri ĝi, ni tamen ne seniliziĝu se la decidoj de UNESKO ne estos tiel favoraj al ni kiel ni atendas. Kaj eĉ se UNESKO faros por nia movado favorajn decidojn ĉu vi opinias, ke tiuokaze la ŝtatoj en ĝi reprezentitaj tuj enkondukos Esperanton en siaj lernejojn? Certe ne. Ĉar ĝenerale la radaro de la ŝtataj muŝiloj turniĝas malrapide, sed pri tio ni ne ĉagreniĝu. Kompreneble favora decido de UNESKO estus paŝo antaŭen kaj helpus influ la publikan opinion. Jen ni estas fakte ĉe la kerno de la tuta afero, ĉar nur la publika opinio povas al ni alporti la venkon. Ŝtatoj aŭ registaroj nur ekagas kiam la publika opinio tion postulas. Estas do nia devo daŭre klopodi influ favore al ni la publikan opinion.

F.W.

dato, kiu unufoje revenis en libertempo. La prezidanto unue komunikis la ĵus alvenintan decidon pri Esp. de la Unesko-kunveno en Montevideo. Poste okazis surpriza vespero: la dudek tri ĉeestantoj, kiuj ĉiuj alportis bone envolvitan nekonatan premion, povis laŭtote elekti unu el ili kaj elpakiĝis ilin ofte grandlabore kaj je la brua ĝojo de ĉiuj.

Lasta kunveno de la jaro okazis la 28-an de decembro kaj estis ĉefe dediĉata al legado kaj klarigado de la artikoloj pri la Jubileaj Festoj en Antverpeno en la ĵus aperinta numero de B.E.

Programo de la sekvantaj kunvenoj:

Ordinara kunveno: ĉiumarde je la 20a, en la sidejo „Gouden Hoorn — Cornet d'Or" Simon Stevinplaats 2.

Januaro (memorige) 7an: Muzika vespero; 11-an: Parolata gazeto: (ĉiu preparu antaŭlegotan tekston pri iu ajn subjekto); 18an: Legado de B.E.: — 25an: Ĝenerala kunsido: Raportoj, Elekto de la komitato; Difino de estonta agado, k.t.p.

Februaro: De la 1-a de februaro ĝis la 26a de julio, dum la unua horo de ĉiu kunveno, okazos malrapida perfektiga kurso, al kiu povos ankaŭ ĉeesti komencantoj. Ekslernantoj de pasintaj kursoj, precipe tiuj, kiuj ne povis ilin regule aŭ ĝisfine sekvi, profitu do tiun okazon pliriĝi siajn ling-

vajn konojn kaj ĉiuj gemembroj konsideru kiel devon varbi kaj alkonduki multajn novulojn.

Dum februaro, dum la dua horo de la kunveno: la 1an: Muzika vespero: — la 8an: Parolata Gazeto: — sabaton, la 12an kaj dimanĉon, la 13an: partopreno al la ligaj jubileaj festoj en Antverpeno: — la 15an: Raporto pri la Jubileaj Festoj de R.B.L.E.: — la 22an: „Libertempo en Anseremme" parolado de F-inoj. Is. Van Parys kaj Y. Poupeye.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero 12.30.48)

La 6-an de decembro okazis la parolata gazeto. La gajninto estis S-ro Castel per sia artikolo: la fungopasteĉo.

La 13-a estis dediĉita al la memoro de D-ro Zamenhof. Tiun eksterordinaran kunvenon enkondukis S-ro VanderStempel per pianludado. La prezidanto D-ro Kempeneers diris la memorigan paroladon. Tiam S-ro Castel laŭtlegis kelkajn paĝojn el „Veterano", kaj S-ino Elly Staes la kongresparoladon de D-ro Zamenhof en Cambridge, 1907. S-ro Piron tre bele deklamis poeziaĵojn de Thévenin kaj de Prévert. Ankaŭ S-ro Nelis kontribuis al la programo per poeziaĵo, kiun legis S-ino Elly Staes. Ĉiuj parolintoj rikoltis grandan sukceson. Per komuna kantado finiĝis tiu solena vespero.

La 20-an de decembro, S-ro VanderStempel donis laŭkute sian perfektigan kurson.

La 27-an de decembro okazis nia kristnaska festo, kiu havis grandan sukceson. La festkomitato zorgis por bonega programo. Sur la tabloj, kiuj estis bele ornamitaj, estis multaj diverskoloraj kandeletoj: verdaj steloj troviĝis abunde ĉirkaŭe en la salono kaj ankaŭ sur la tabloj. En la fono staris malgranda, sed feste ornamita kristnaska arbo. Eĉ la tradicia liteto ne mankis. S-ro VanderStempel enkondukis la vesperon per pianludado. S-ino Elly Staes kantis du kristnaskajn kantojn. Sekvis komuna kantado de kristnaska kanto el la XIV-a jarcento, kiun tre bele tradukis S-ro Castel. S-ro Piron ĉarmigis nin per kelkaj mallongaj kantoj kaj akompanis sin mem per la gitaro. S-ro Jacobs pianludis valsojn de Chopin. Tiam S-ino Elly Staes laŭtlegis de A. Daudet „La tri senkantaj Me-soj", majstre tradukita de S-ro Castel. S-ino Daems alportis belajn esperantajn diskojn. Post ĉiu numero aŭdiĝis laŭta aplaŭdo. Poste venis la tomblolo. Ĉiuj gesamdeanoj alportis malgrandan donacon, kiuj estis numerataj ĉe la komenco de la kunveno, kaj je la fino de la vespero ĉiu ricevis laŭ la lotumita numero alian paketon.

Bonega Propagando

Ni kompreneble ne kapablas citi tie ĉi ĉiujn ĵurnalojn kiuj favore parolas pri nia afero.

Ni tamen ankaŭ ne povas silenti pri impone grava artikolo kiu aperis en „La Nouvelle Gazette" de Charleroi kaj kiu donis, sur tri kolonoj, ilustritan intervjuon de nia Liga Prezidanto pri la evoluo de nia movado, pri Montevideo, k.t.p.

Laŭ iniciato de S-ro De Kegel, tiu intervjuo estis „prenata" kaj ellaborata de S-ro R. Brohet, redaktoro de tiu ĉi ĵurnalo.

Al ambaŭ iras nia kora danko pri tiu bela artikolo kies titolo estas „Une ère nouvelle s'ouvre pour l'Esperanto" — en grasaj literoj —, nous déclare M. Maurice Jaumotte, président de la Ligue Esperantiste Belge".

kelkfoje kun laŭta ridado pro la surprizo. La vespero estis unu el niaj plej belaj de la pasinta jaro, kaj la prezidanto havis la agrablan taskon danki kaj gratuli ĉiujn helpantojn kaj speciale la S-inojn Castel, Elly Staes, Daems kaj la S-rojn VanderStempel, Oleffe, Jacobs kaj Castel. Estis nia lasta kunveno de la jaro 1954.

Programo de la sekvantaj kunsidoj

Februaro: Londono, la 7an: Parolata ĵurnalo; sabaton la 12an kaj dimanĉon, la 13-an: Partopreno al la ligaj jubileaj festoj en Antverpeno; londono la 14an: Muziko de George Gershwin, de S-ino Elly Staes; la 21an: Perfektiga kurso gvidota de S-ro VanderStempel; la 28an: Parolado de S-ino Ernst: Vojaĝo kun neatendita fino.

VERVIERS

Esperanto-Grupo de Verviers

Komenciĝis en Verviers, dank' al la apogo de S-ro Prof. Vanbreuse, kiu varbis lernantojn inter la studentoj de la Ateneo, dank' ankaŭ al la apogo de la prefeto de la Ateneo, kiu disponigis salomon kaj aparatojn por prelego de Prof. Vanbreuse, pri „La Vivo de la Abeloj", du kursoj, kiuj havis plej grandan sukceson.

Unu ĉe la Provinca Teknika Altlernejo havis 65 lernantojn, inter kiuj estas la sekretario de la lernejo, du profesoroj kaj unu kurs-kontrolanto. Tiu ĉi kurso okazas kun permeso de la provincaj aŭtoritatoj. Alia kurso funkcias kun 12 gelernantoj, ĉe komunuma lernejo.

La tagĵurnaloj bone helpis al la propagando, kaj raportis pri la parolado de Prof. Vanbreuse, dum „Le Courrier" aperigis iom longan artikolon pri la Montevidea demando kaj la sukceso, kiun ni fine tie akiris.

KARUSELVOJAĜO

Kio estas karuselvojaĝo? Karuselvojaĝo estas tute nova sistemo de vojaĝo speciale por esperantistoj. Mi donos al vi klarigon. Prenu la geografia karton de Nederlando, Germanujo, Luksemburgo kaj Belgujo. Faru linion inter la urboj Amsterdam, Arnhem, Kolonjo, Wiesbaden, Luksemburgo, Bruselo, Amsterdam. Vi nun havas cirkulon. Jen vojaĝo, kiun vi povas fari per aŭtobuso.

La esperantisto, kiu eksidis en la aŭtobuso en Amsterdam tiel faris la tutan rondon. Por li la vojaĝo finiĝas en Amsterdam. La vojaĝo tamen ne estas aranĝita nur por Amsterdamanoj, ĉar la ŝoforo faras duan rondon. Esperantistoj, kiuj dumvoje en Arnhem, Kolonjo, Wiesbaden, Luksemburgo aŭ Bruselo aliĝos al la grupo, restos do en la aŭtobuso kaj veturos ĝis la loko, kie ili komencis la vojaĝon. La aŭtobuso ne faras nur du rondojn, sed ĝi restas veturanta dum la tuta somera sezono. Vi do povas kompari la vojaĝon kun karuselo, kiu konstante rondiras. Jen kial ĝi ricevis la nomon karuselvojaĝo.

Kio estas la efiko, kiam esperantistoj el Nederlando, Germanujo, Luksemburgo kaj Belgujo partoprenos ĝin?

a. Esperantistoj, kiuj ne povas partopreni internacian kongreson, tamen povas esti en Esperantujo.

b. La vojaĝkostoj povas esti malaltaj, ĉar la prezoj ne estas influitaj de reklamkostoj, ĉar la reklamado okazas pere de propraj revuoj, gazetoj kaj cirkuleroj.

c. Ĉar oni vizitas regule la samajn hotelojn, restoraciojn, vidindaĵojn, suvenirvendejojn, k.t.p. kiel klientoj, oni povas postuli, ke la diversaj estroj apliku Esperanton.

d. La esperanto-klubo en urboj, kie oni tranoktas aŭ restadas, povas utiligi la viziton por siaj membroj.

e. La vojaĝoj kontribuas al la efektivigo de internacia unueco, pri kiu la aŭtoritatoj, diplomatoj kaj politikistoj konstante trumpetas.

f. Esperanto manifestas sian taŭgecon.

Partoprenante ĉi tiun vojaĝon vi do profitas ekonomie, vi praktikas Esperanton kun eksterlandanoj, vi propagandas Esperanton, dum kiam vi estas la tutan vojaĝon en vera internacia rondo familia.

En la venonta numero vi aŭdos pliajn detalojn pri la karuselvojaĝo. La vojaĝo okazos sub la aŭspicio de la Esperanto-movado.

Informojn volonte donos la aranĝanto

Hans Bakker.

v. Tuyll v. Serooskerkenplein 33 Amsterdam-Z. (Nederlando).

Verdlando Vokas

Listo de radiodissendoj en aŭ pri Esperanto. Tempindiko: M.E.T. (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Belgujo, Nederlando kaj Svisujo. Mallongigoj: I = informoj. P = paroladeto. K = kurso. M = muziko.

LUNDE:

13.30—14.00 La Coruna (Hispanujo), 250 m.: P kaj K.
23.10—23.20 Vieno I, 25,46 m., 48,74 m., 513 m.: I.
23.15—23.30 Hilversum II, 298 m., 188 m., N.C.R.V.: P kaj M (nur unufoje monate. Detaloj pri dato kaj temo ne ricevitaj).

MARDE:

12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: P de d-ro Arthur Baur.
15.30—15.45 Montevideo (Urugvajo), 280 m.: P (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
15.50—16.00 Ljubljano (Jugoslavujo), 327 m., 211,4 m.: K.
18.35—18.40 Berno, ondlongoj kaj P kiel 12.55.
23.30—24.00 Valencio, 200 m.: P.

MERKREDE:

16.30—16.40 Vieno II, 25 m., 30 m., 41 m., 48 m., 203 m.: P. (Nur ĉiudu-semajne).
17.00—17.10 Caramulo (Portugalujo), 206 m.: P de Alfred Sales.
18.50—19.10 Romo: 31,33 m., 49,92 m.: P de Luigi Minnaja.
20.30—20.45 Barcelono (Katalunujo), 360 m.: I kaj K.
23.15—23.20 Hilversum I, 402 m., V.A.R.A.: I.

JAŬDE:

07.45—08.00 Perpignan-Sousillon (Francujo), 202 m.: K de R. Llech Walter kaj R. Gendre.
09.30—09.45 Parizo, 348 m., 218 m.: K de Pierre Delaire.
12.55—13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m., 75,28 m.: P de prof. d-ro Edmond Privat: „Esperanto-ideologio".
18.35—18.40 Berno, ondlongoj kaj P kiel 12.55.
23.50—24.10 Zagreb (Jugoslavujo), 264,7 m.: P.

VENDREDE:

18.50—19.10 Romo, 31,33 m., 49,92 m.: P de prof. d-ro V. Musella.
22.30—22.45 Gvatemalo, 30,50 m., 47 m., 197 m., 470 m.: I.

SABATE:

09.30—10.00 Rio de Janeiro, 30,71 m., 375 m.: K kaj I.
23.15—23.20 Hilversum I, 298 m., 188 m., K.R.O.: I.

Informoj kaj petoj:

La Esperantistoj havas la dissendojn, kiujn ili meritas. - Aŭskultinte Esperanto-radiodissendon kun pli aŭ malpli da plezuro, nepre sendu poŝtkarton kun kelkaj linioj al la aŭdita stacio por sciigi, kiel vi ricevis tiun ondon en via loĝloko, ĉu klare aŭ ne-klare, kaj kiel vi opinias pri la enhavo de la program(et)o. Bonvola, konstrua kritiko estas tre bona kaj favore influas postajn dissendojn.

Radio Roma. - Jen detaloj pri la programoj en januaro 1955-a: 5: Mondo esperantista. 7: La blindulo Louis Braille inter la granduloj en la Pariza Panteono. 12: Informoj el Italujo. 14: Leterkesto kaj bibliografio. 19: La klera Bolonjo. 21: Italaj belartaj urboj: Certaldo. 26: Opero „Turandot" de G. Puccini. 28: G. Bocaccio, la patro de la itala prozo. Jen detaloj pri la programoj en februaro 1955-a: 2: Mondo esperantista. 4: Respondoj pri leteroj de geaŭskultantoj al la stacio Radio Roma, Esperanto-fakto, Casella Postale 320, Romo (Italujo), kaj bibliografio. 9: Informoj el Italujo. 11: Italaj sanktejoj: „Loreto". 16: Opero: „La Forto de la Destino" de G. Verdi. 18: Unufoje ĉiujare decas frenezigi. 23: Bolonja folkloro. 25: La Cindroj. Merkrede prelegas s-ro Luigi Minnaja, vendrede prof. d-ro Vincenzo Musella.

Radio Berno. - Speciale ni atentigas pri la bone aŭdeblaj kaj aŭskultindaj Esperanto-dissendoj de ĉi tiu svisa stacio (vidu horojn kaj ondojn ĉi-supre!). D-ro Baur kaj prof. Privat estas famaj oratoroj, kies temoj estas interesaj kaj kies prononco estas imitinda ekzemplo. Esprimu vian kontentecon al Svisa Mallongonda Servo, Neuengasse 23, Bern (Svislando), kiu sendas laŭ peto tre bele ilustritan programkajeron „Ici la Suisse!"

Informojn pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TIERKWERD bij BOLSWARD (Frislando), Nederlando.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

(Solvaj estas sendotaj al S-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 10a de januaro 1955.)

Al ĉiuj amikoj-solvantoj la Enigmo-angulo prezentas siajn korajn dezirojn por la nova jaro. Ĝi esperas, ke ankaŭ ĉi-jare ĝi povos havigi al ili kelkajn distrajn kaj samtempe instruajn momentojn.

Pro memorigo, ĝi ripetas la regularon de la konkurso, al kiu ĝi invitas ĉiujn membrojn-legantojn.

1. Ĉiu korekta solvo havigas 5 poentojn al la partopreninto; solvo nur parte ĝusta ne tute senvalorigas.
2. Ĉiunonate premio estas atribuita al la solvinto kun la plej alta poentnombro.
3. La konkurso ĉiam daŭras.
4. Difino kun (R) celas vorton, eĉ derivitan aŭ kunmetitan, sen la gramatikaj finaĵoj A.E.I.O.
5. Ĉiu uzata radiko troviĝas en la vortaro de SCHIDLOF aŭ MEULENHOFF, aŭ en la PLENA VORTARO DE ESPERANTO (Grosjean-Mauvin) kun ĝia SUPLEMENTO.

Nomoj el niaj Literaturo kaj Movado estas troveblaj en:
ISBRUCKER/Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado.
DEGENKAMP/Esperanto 60-jara.

SOLVOJ.

181. ventmontrilo; ĉambrestino; violoncelo; sakfajfilo; edelvejso; malsovaĝa; kukumeto; sparkilo; panariso; likvidi; kuniklo; aparato; levkojo; sinjoro; marini; kokoso; najado; kobajo.

Vi forkarezis - ja kiel ĉe infano -
La ĝendoloron de miaj du kulpikoj,
Kaj kiam skribas al vi tiu mano
Sekretalvokas mi por samaj kisaplikoj.
(El: „Memorajo”: novembra numero de nia gazeto)

182. ama; sam; alf; map; ino; mielo; aĵl; kontraŭ; natri; teorie; natur; ŝip; kal; suk; traf; oazo; rompebl; leono; glori; Lamen; ŝtala; li; akir; afekt; paroli; lorn; fon; amoniak; mot; talp; spertul; ega; aer; obi; miaŭo; salon; nj; reuz; bolti; kopii.

ALDONU LITERON.

Post ĉiu numero estas donitaj du klarigoj respondantaj al serĉotaj vortoj el kiuj la duan oni trovas aldonante literon antaŭ aŭ inter la literojn de la unua vorto. La aldonitaj literoj, legataj en la sama sinsekvo, formas proverbon.

1. rilato inter efektivaj dimensioj de objekto kaj tiu de desegno kiu ĝin figuras; — haŭto de la kranio kun la haroj. 2. akcidenta nefunkciado de aparato; — parto de meblo. 3. malesto; — parto de jak. 4. ĉirkaŭa parto; — alkoholaĵo. 5. vertebraro; — homo sekrete observanta. 6. akcesoraĵo; — konsonanto formita helpe de longo kaj dentoj. 7.

granda kvanto; duonnegro. 8. objekto malpli dika ol longa kaj larĝa; — parto de buŝo. 9. skuetiĝi; — enakvigi. 10. knedante formi objekton; — nuanci la voĉon. 11. desegno pri konstruo; — parto de piedo. 12. nutraĵo — ekzerco por ĉevalo. 13. ne troa; — novmoda. 14. ŝipeto; — budo. 15. kondukejo por akvo; — fripono. 16. parto de farmbieno; — metitablo. 17. amasego; — parto de jaro. 18. maŝinkudri; — streĉi la fortojn por atingi celon. 19. arbo; — enloĝanto de sama lando. 20. bandaĉo; — intesta doloro. 21. kermesa tendo; — rondo. 22. juvelo; — paserbirdo. 23. stangejo; — ĉefo. 24. korp parto; hejtajo. 25. sfero; — pripenso. 26. instruita; — ege malbonhumora. 27. fotografa plato; — parto de ĉambro. 28. dombestoj; — burĝono en vinagro uzata kiel spicaĵo. 29. marfiŝo; — frukto. 30. nepetite disponigi; — proponi ion aĉetotan. 31. libera spaco; — luksa domo. 32. fortranci per speciala ilo; — bruegi. 33. skribilo; — metalo. 34. metalo; — diablo. 35. kne-debla substanco; — ekleziulo. 36. enlasi kaj ellasi aeron; — suferi pro dezirego.

184. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 2. koncernanta ĉefon; facile komprenebla. 3. per ili oni kunigas metalajn pecojn(R). 4. plumtufo(R). 5. kontraŭstari. 6. iumaniere senvivigi(R). 7. prepozicio; vazo(R). 8. korpampleksa(R). 9. havi inklinon. 10. pro multo da arboj oni kelkfoje ĝin ne vidas(R); mono(R). 11. konforma al la realo(R); korpa organo(R).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											

Vertikale. 1. origino(R); malplenaĵo (R). 2. envoli en paperon(R); denove (R). 3. porĉiama; pli-malpli plena manko de lumo(R). 4. malproksima(R). 5. spirito(R); altvalora globeto(R). 6. malaperanta vorto por: kovri per tavolo de valora metalo(R). 7. parto de jaro (R); korp parto. 8. en montrita loko. 9. ridige imiti; li vivas en Afriko(R). 10. malgranda kvanto da fluaĵo(R); en iu loko. 11. korp parto; arbo(R).

Beneluksa Kongreso 1955

Utrecht, 28-30/5/1955

Relegu la pasintrumeran artikolon kun la unuaj informoj kaj al aldonitan aliĝilon, kiun vi nepre tuj pleniga kaj ensendu!

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe

BELGOMINE

FRANKRIJKLEI, 20

ANTVERPEN O

kiu donas specialan premion

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPEN O

Por via MUZIKO.

RADIO kaj GRAMOFONO

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaĵo prezoj

Moderna komforto

Sidejo de „Bruga Grupo Esperantista.

Tel. 314.59

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel. : 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

Verantw' uitgever: Reĝa Belga Ligo Esperantista, De Bruynlaan 44, Wilrijk, Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Lithuizen (Ned.)